# La NASKa Fasko

*Taggazeto de la Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto, ĉe UCSD*

ĵaŭdon, la 8-an de julio, 2010 • numero ok



## Venontaj eventoj

### ☞ Hodiaŭ ☜

★ **2:00 ptm:** Brandon prezentos pri Brazilo, Esperanto kaj spiritismo en la komuna salono.

★ **7:30 ptm:** tabul-ludoj en la komuna salono.

### Vendredo

★ **2:00 ptm:** Paŭleto instruos dancadon! Renkontiĝu en lia salono, Asante #223.

★ **7:30 ptm:** filmovespero: *Conlang* kaj *Flugigi polpon ("Flying an Octopus")*

### Sabato

★ **9:00 atm:** Programo de ESF. Kunvenu en AP&M 4301. *(Vidu detalojn en pĝ. 2)*

★ **ptm:** Festo ĉe d-ro David Jordan

### Dimanĉo

★ **atm:** Ekskurso: urbocentro de Sandiego: Parko Balboa, Bestĝardeno, la haveno kun militŝipoj, kaj pli…


***La NASKa Fasko***


**Redaktejo:** *Asante* n-ro 116
<nask.esperanto@gmail.com>

*La NASKa Fasko* aperas lunde – vendrede dum la kursaro. Kutime ĝi aperas tagmeze. Se vi ne ricevas ĝin post la matenaj klasoj aŭ en la manĝejo, prenu ekzempleron el la skatolo kiu troviĝas sur la fenestro de la redaktejo.

Ni avide atendas viajn artikolojn, fotojn, desegnaĵojn, bildstriojn, poemojn, viajn am-leterojn… preskaŭ ion ajn! Memoru, la *Fasko* estas taggazeto ***por vi kaj pri vi***: viaj kontribuaĵoj igas ĝin interesa. Do nepre kontribuu!

Se vi ne sentas vin tute kompetenta pri verkado, ne timu; ni volonte helpos vin korekti kaj poluri. Serĉu unu el niaj lingvo-helpantoj; sur siaj nomŝildoj ili portas specialajn glumarkojn kun rideto (☺) – kaj ili ridetante helpos vin korekti, poluri, kaj plibonigi vian verkon. Kiam la verko pretas, sendu ĝin per retpoŝto al la adreso supre, aŭ simple portu ĝin piede al la redaktejo.


# Teeeeeeeertremo!




La usona geologia agentejo USGS raportas, ke hieraŭ, je la 4-a horo kaj 54 minutoj posttagmeze, ni travivis tertremon de 5.4 gradoj laŭ la skalo de Richter. La centro okazis proksimume 11 kilometrojn (7.3 mejlojn) sub la tersurfaco, kaj la surcentro (la plej proksima loko ĉe la surfaco) situis proksimume 94 kilometrojn (58 mejlojn) nordoriente de ni, en la dezerto Anza-Borrego. Por NASKanoj el pli stabilaj regionoj, estis rimarkinde (kaj timige!) senti la subbruon kaj vidi lampojn skuiĝi. Tamen por kalifornianoj, la sperto estas sufiĉe kutima.

Kie vi estis, dum la tertremo? Ĉu vi timis? Ĉu vi ĝuis? (Ĉu vi eĉ rimarkis?)

## Malkovru la sekretojn de Esperanto-USA

*De Tor Kinlok*

Se vi interesiĝas pri la internaj aferoj de Esperanto-USA kaj pri tio, kion la estraranoj faras, bonvolu viziti la virtualan lokon kie la estraro laboras: la Yahoo-grupon "eusa-gvidantoj".

Ĝi estas laborejo por la ĉefaj gvidantoj de Esperanto-USA. Nur la gvidantoj rajtas krei anoncojn en la grupo, sed ĉiuj membroj de Esperanto-USA rajtas legi la mesaĝojn. Membroj de la listo rajtas ankaŭ legi la arĥivon de anoncoj. Membroj de Esperanto-USA kaj gravuloj/estroj de aliaj landoj rajtas membriĝi.

Jen la URL:

http://tech.groups.yahoo.com/group/eusa-gvidantoj



**Morgaŭ**: Paŭleto instruos facilan dancon de Argentino. La danco nomiĝas *Carnavalito*. Vi ne nur ekscios la signifon de la danco: vi ankaŭ dancos! Sed ne timu: vi ne bezonas dancajn lertojn. Se tempo permesos, Paŭleto instruos unu aŭ du aliajn internaciajn dancojn.

Esperantic Studies Foundation invitas vin al publika konversacio pri

# Esperanto: pasinteco, nuntempo, estonteco





**Partoprenantoj:**

- **Humphrey Tonkin**
- **Wally du Temple**
- **Grant Goodall**
- **kaj vi, la ĉeestantoj!**

**Sabaton, la 10an de julio, 2010 9:00 – 11:30 matene**
**Applied Physics & Mathematics 4301, Muir College, UCSD**

**Provizora program:**
9:00 Temo I: "Esperanto en 1960 kaj nun: Kiel la movado ŝanĝiĝis dum la pasintaj 50 jaroj?"
10:00 Kafpaŭzo
10:20 Temo II: "Esperanto en 2060: Kiel ĝi fartos post 50 jaroj?"



**"Ĉu li faras tion por sciigi nin pri baldaŭa enlitiĝo?"**
(el *Kulturaj Kajeroj*, 1964:2)



Paŭleto montras sian sendependecon! Katalin fotis nian argentinan bravulon antaŭ tiu ĉi petrolvora "monstro-kamiono", laŭvoje al la fajraĵoj en La Jolla por festi la tagon de usona sendependiĝo.